nia voĉo

madrida esperanto-liceo oktobro 2021

## NOKTO DE LA LIBROJ KUN LORCA

La 1an de oktobro 2021 Madrida Esperanto-Liceo celebros la unuan ĉeestan aktivaĵon en la sidejo post bedaŭrinde multaj monatoj. Ni aliĝos al la celebrado de la **Nokto de la Libroj**, kiun la Madrida Komunumo organizas (unue antaŭvidita por aprilo, sed fine prokrastita al tiu ĉi dato). Madrida Esperanto-Liceo aperas en la broŝuro kaj kalendaro de la evento.

Ni omaĝos al la granda poeto Federico García Lorca, okaze de la 50a datreveno de la traduko al Esperanto de lia verko "Cigana romancaro", kaj de la 85a datreveno de lia murdo. Hispana Esperanto Federacio reeldonas en bita formo tiun ĉi jam klasikan verkon, kaj ankaŭ publikigis novan antologion de poemoj de Lorka, tradukitaj en Esperanton fare de Miguel Fernández, kun titolo "Omaĝe al Lorca". La oficiala prezento de ambaŭ verkoj okazos dum la Hispana Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare disvolviĝos virtuale dum la 2a kaj 3a de oktobro.




Madrida Esperanto-Liceo aliĝas al tiu ĉi kunmemoro, kaj tial la evento pretigita por tiu ĉi Nokto de la Libroj konsistos en la prezentado de ambaŭ verkoj, sekvata de libera deklamado de poemoj de Lorca, en kiu povos partopreni la ĉeestantoj.

Ni atendas vin ekde la 18,30. La ĉeesto estos libera, sed la nombro estas limigita, do, oni nepre demandu antaŭe al madrid@esperanto.es ĉu restas loko, kaj ni petas tre atenti la bazajn prisanajn kriteriojn.

Ĉe la sidejo aĉeteblas ekzempleroj de tiu malnova papera eldono de "Cigana romancaro" kontraŭ la favorega preco de 2 eŭroj. Kaze ke vi ne povas ĉeesti, aŭ ke ni jam ne rajtos enirigi pliajn homojn en la sidejo, vi povas partopreni virtuale pere de Jitsi, per tiu ĉi adreso ĉe via navigilo: https://meet.jit.si/MadridaEsperantoLiceo. Oni filmos la eventon, do ĉiuj partoprenantoj (ĉeestaj aŭ retaj) rajtigas nin publiki tiun filmeton eĉ se ili aperas en ĝi.

Ĉar la lingvo de la evento estos precipe la hispana, ne dubu diskonigi la aferon al viaj amikoj.

## HISPANA VIRTUALA KONGRESO

Kiel dirite, la sekvan tagon, la 2an de oktobro, komenciĝos la 79a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu ĉijare okazos virtuale dum tiu ĉi unua semajnfino de oktobro. La sabaton oni prezentos la librojn de Lorca por la esperantista publiko.

En la kongresretejo https://www.esperanto.es/kongreso vi povas konsulti la tutan programon, kaj la maniero aliri la kongresejon.

Vi povas aliĝi rete en la adreso: https://esperantujo.io/hef/alighilo/. La aliĝo estas senpaga.

## KURSO KAJ PREZENTADOJ EN FUENLABRADA

Ankaŭ Fuenlabrada Esperantista Ligo planas komenci sian ĉeestan aktivadon en la venontaj datoj. Ĝi anoncis ĉeestan kurson ekde la 12a de januaro 2022. Ĝi daŭros kvin monatojn, kun klasoj dufoje semajne (marde kaj ĵaŭde). Ĝi okazos en la nova sidejo de la asocio, en la C.E.P.A. "Paulo Freire", strato Creta, 2, de Fuenlabrada (apud metrostacio Fuenlabrada-Central). La prezo estos 25 eŭroj por la tuta kurso, pagota post la dua klaso. Kiel lernolibron oni utiligos "Esperanto per rekta metodo" de Stano Marĉek.

Por diskonigi la kurson kaj Esperanton ĝenerale, Juan del Castillo prelegos en tiu sidejo po unu fojon ĉiusemajne ekde la 18a de oktobro. Por pliaj informoj pri la kurso aŭ la prezentadoj skribu al la adreso: esperantoesdetodos@gmail.com.

## DENOVE KURSOJ DE ESPERANTO EN LA UNIVERSITATO UNED

Malfermiĝis denove ĉijare la periodo por enskribiĝo en la kursoj de la Centro pri Lingvo-instruado CUID de la Universitato por Neĉeesta Edukado de Hispanio UNED. Ĉijare denove eblas enskribiĝi en la baza kurso (nivelo A2 laŭ la Eŭropa referenckadro por instruado de lingvoj), kaj en la nivelo B1, al kiu povas aliri la homoj trapasintaj la nivelon A2 en antaŭaj okazoj kaj ankaŭ tiuj kiuj jam havas iujn konojn kaj trapasas la pretigitajn nivelekzamenojn.

La periodo finiĝas la 22an de oktobro. Ĉiuj detaloj, inklude de la maniero enskribiĝi troviĝas en la retadreso: https://www.cuid.uned.es/.

## PREZENTADO DE ALIA LIBRO

La lundon 4an de oktobro, la Asocio de idoj de hispanaj ekzilitoj ADEE prezentos la duan volumon de librokolekto pri la perdo de talento post la hispana ekzilo. En tiu ĉi nova libro, inter la biografiitoj aperas konata esperantisto, la militisto Julio Mangada. Lian profilon verkis Toño del Barrio. La prezentado okazos en la Historia Biblioteko "Marqués de Valdecilla", en la strato Noviciado, 3, de Madrido, la lundon 4an de oktobro, ekde la 18,30.

## FILMOJ PRI ĴUSAJ PREZENTOJ KAJ EVENTOJ

La Belartaj Konkursoj de UEA, kies disdon-festo, kiel anoncite, okazis la 19an de septembro, premiis du hispanojn: Francisco Javier Moleón, per la unua premio en la kategorio Prozo, kaj Antonio Valén, en la nova kategorio Kanto-teksto. Gratulon! La ceremonion vi povas spekti en la kanalo de UEA ĉe: https://www.youtube.com/watch?v=NE1Ye1eh6o4.

Ankaŭ en tiu kanalo eblas spekti la omaĝon al Gian Carlo Fighiera, ene de la "Tago de veteranoj" organizita de UEA. Dum ĝi estis esprimitaj pluraj atestoj de membroj kaj eks-membroj de Madrida Esperanto-Liceo, kiuj memorigis la tre valoran agadon de Gian Carlo kaj lia edzino Ada dum ilia loĝado en Madrido dum la 80aj jaroj. Vi povas spekti la tuton ĉe: https://www.youtube.com/watch?v=2DRC0jWESso.

## RAPORTO EN KVARTALA GAZETO

Sekve al la informado farita okaze de la Tago de Esperanto en julio, la gazeto "Chamberí 30 días", kiu informas pri la kvartalo Chamberí, kie troviĝas la madrida sidejo, pretigis raporton pri Esperanto kaj pri Hispana Esperanto-Federacio, surbaze de intervjuo farita al aktivuloj. Vi povas legi ĝin en la retejo: https://www.chamberi30dias.es/reportajes/chamberi-punto-encuentro-difusion-esperanto.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Pro la Hispana Kongreso, la **monata renkontiĝo** transiras al la dua sabato, la 9an de oktobro. La loko estos la sama, se la vetero tion ebligas: la statuo de Ricardo Codorniu, proksime al la Vitra Palaco en la Parko Retiro. La horo estos la kutima, la 18,30 horo. Kiel ĉiam, ni sekvos la kriteriojn pri KOVIM-prevento koncerne distancon kaj protekton.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

~~Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo~~

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com